

≡galecen



Manifesto de Egalecen

Ni estas kolektaĵo de Esperantistoj, kiuj celas blogi pri pluranea feminismo en Esperanto. Ni esperas, ke per nia blogo ni povas antaŭenpuŝi Esperantuĵon al la nivelo de socijusteca komunikado kaj interkompreno de aliaj neesperantaj feminismaj rondoj. Pli eksplicite, ni kredas:

- ke formoj de subpremado interligiĝas, kaj bezonas esti analizataj de nuancita vidpunkto;
- ke la plej bona informanto pri iu subprema sistemo estas homo, kiu mem estas viktimo de ĝi, kaj ke ni nur transprenu tiun rolon kiam absolute necesas kaj ni verku surbaze kaj informite de diraĵoj/skribaĵoj de homoj de tiuj grupoj;
- ke ĉiu rajtas kontribui al la blogo kaj la diskutoj, sed nur se ri respektas la spertojn de subpremataj homoj kaj kredas je la rajto de subpremataj grupoj difini identecon por si mem;
- je pli bona Esperantuĵo, kiu forlasas kaj kondamnas Eŭropcentrismon, rasisman, kvirfobion, handicapisman, kaj aliajn specojn de malegaleco;
- je graveco de transnacia perspektivo kiu ne nur inkluzivas diversajn landojn kaj regionojn de la mondo, sed ankaŭ pritraktas mondajn asimetriojn de povo kaj malkonstruas koloniismajn pensmanierojn.

Pluraneco



“Unu barakto – restu kune!”

En diskutoj pri socia justeco anglalingve oni ofte uzas la vorton ‘intersectionality’. Ĉikadre ĝi aludas la aferon, ke, kvankam en kutima diskutado oni emas individue kaj aparte pritrakti la konceptojn de raso, genro, seksuma orientiĝo ¹ ktp., tiuj identecoj kaj grupapartenoj ja estas plure haveblaj, kaj la interkruciĝo de tiuj homaspektoj donas unikajn vivspertojn al ĉiuj. Mi uzos tradukon Esperantan ‘pluraneco’, ĉar ĝi temas pri aneco en pluraj el tiuj grupoj.

Do kial pluraneco gravas kaj diskuntindas? Unue, la apartigema diskutmaniero, kiun mi menciis supre, povas esti damaĝa. Ekzemple, multaj homoj nomas la movadon pri egalaj rajtoj por samseksemuloj la ‘nova movado pri civilaj rajtoj’, t.e. komparante ĝin rekte al la dudekjarcenta lukto por liberigo kaj egaligo de nigruloj. Ignorante la klarajn malsamecojn inter raso kaj seksuma orientiĝo, necesas memori, ke eblas esti kaj nigrulo kaj gejo aŭ lesbo (aŭ eĉ ambaŭseksemulo – la ignorado kaj forviŝado de ambaŭseksemuloj estas alia grava temo). Kaj fakte, pli da malblankuloj identas sin kiel GLATanoj ol blankuloj, kvankam la reganta komunikilaspektigo de GLATuloj estas blankula kaj riĉa. Nur pere de diskuto de la pluraneco de nigrulaj gejoj kaj lesboj ni povas eviti tiajn miskoncepitojn.

Due, aparteno al pluraj subpremataj grupoj forte influas la socian percepton de oni, kaj oniajn vivspertojn. Esti blankulino kaj esti nigrulino estas du tute apartaj aferoj. Mi sekvas multajn nigrulinojn en Twitter kiuj pepas pri rastemoj, kaj mi per ili multege lernis pri kaj seksismo kaj rasismo – aferojn, kiujn mi ne povintus lerni simple de ekz. nigrulaj viroj

¹ Oni diris al mi, ke ĉi tio estas iomete nekutima lingvouzo, kaj oni emas pli diri ‘sekxa’. Tamen, laŭ mi estas gravas diferenco inter ‘sekxa’ kaj ‘seksuma’, t.e. ‘rilate al seksoj’ kaj ‘rilate al genropreferencoj je seksumado’, kiu aparte gravas havi en ĉi tia blogo.

kaj blankulaj virinoj. Estas tre trafa profilpriskribo de unu el ĉi tiuj sekvatoj – ‘Mi aŭdacas esti kaj nigrulo kaj ino’. Al nigrulinoj estas certaj stereotipoj pri disputemo, parolmaniero, ŝminkaĵoj ktp. – denove, aferoj, kiujn oni ne rimarkus se oni lernus pri feminismo nur de blankulinoj.

Trie, malmuntante la binariecon de la supre priparolitaj identecoj, pluraneco ebligas al ni pli profunde kompreni tiujn identecojn je flua skalo. Ekzemple, kolorismo (‘colourism’) agnoskas, ke malblankuloj ne ĉiuj spertas diskriminacion samgrade, sed ke plejparte rasa diskriminacio funkcias laŭ nigreco de la haŭto. Mi ne volas diri ‘ju pli nigra, des pli subpremata’, ĉar tio estus same reduktema kiel la pensmanieroj kiujn mi kritikas, sed meksikdevena usonano ne spertos la saman diskriminacion kiel afrikdevena usonano.

Kvare, tra pluraneco oni povas vidi, ke oni povas esti samtempe subpremata minoritato kaj samtempe sufiĉe privilegia. Kvankam mi estas gejo, mi tamen estas blankulo kaj viro, kaj pro tiuj du lastaj aferoj mi havas multe da privilegio. Estas grave agnoski proprajn privilegiojn, ĝuste kiel estas grave agnoski kiel kaj kiom aliaj estas subpremataj.

Fine, mi pensas ke kompreno na pluraneco estas nepra por esti ideologie antaŭenpensa esperantisto. Se ni kiel esperantistoj volas vere atingi globan pacon kaj interkompreniĝon, ni devas fari pli ol simpli kanti la himnon kaj partopreni internaciajn renkontiĝojn. Ni okupiĝu pri sinedukado ĉirkaŭ ĉi tiuj temoj, por ke ni povu klare kaj klere koni la sociajn problemojn kaj agi lerte kaj efike.

Kial iĝi riisto



Antaŭatentigo: Ĉi tiu artikolo tute ne temas pri “lingvistikaj” argumentoj, t.e. kio estas pli facila, pli natura kaj simile. Tiujn mi prifajfas.

Ĝis nun mi ne sukcesis entusiasmiĝi pri riismo. Mi sciis ke ĝi ekzistas, aŭdis la argumentojn kaj kontraŭargumentojn, kaj tie la afero finiĝis por mi. Mi ne estis kontraŭ, sed mi ne vidis bonan kialon por mem riistiĝi.

Tio estas ĉar mi erare pensis ke la sola maniero en kiu riismo subtenas egalecon temas pri egaleco de viroj kaj virinoj – aŭ mi prefere diru: de inoj kaj iĉoj (ekde nun mi skribas riisme). Mi tiam komprenis ke la nuraj du celoj de riismo estu ke:

1. se oni parolas pri homo en la tria persono, ne gravu ĉu la homo estas ino aŭ iĉo (la celo de “ri”)
2. ne estu tiel ke la iĉa formo estu baza kaj la ina formo derivita, kio sugestus ke iĉoj pli gravas (la celo de -iĉ-)

Mi ege subtenas egalecon de inoj kaj iĉoj, sed tamen ĉi tiu kialo ne sufiĉis por konvinki min. Kio do ja konvinkis min? Estis pensoj pri homoj **kies genra identeco estas alia ol ina aŭ iĉa, kaj pri homoj kies seksa orientiĝo ne estas aliseksema**. Mi legis plurajn artikolojn en la angla pri tio kiel neŭtraligi nian anglalingvan paroladon tiel ke ĝi ne ekskluzivu tiujn homojn, ke ĝi ne supozu ke ĉiu estas aliseksema kaj aŭ ina aŭ iĉa. Mi ekkonsciis ke tio estas VERE GRAVA en ĉiu lingvo kaj ke mi volegas ekparoli tiel ke mi neniu ekskluzivu. En Esperanto, riismo povas helpi tiun celon. Lasu min ilustru kion mi celas per kelkaj ekzemploj.

Unua situacio: Vi parolas kun amiko, ekscias ke ri estas en amrilato, kaj volas demandi pri ria koramiko. Se vi demandas ekzemple “Kiel li/ŝi (via koramiko/koramikino) nomiĝas?”, vi havas antaŭsupozon pri la seksa orientiĝo de la koncernaj homoj. Imagu kiel sentas sin ekzemple iĉo kiu havas koramikiĉon kaj ricevas demandon pri “ŝi” aŭ pri sia “koramikino”. Ĉu ri devas respondi “Hmmm... fakte estas ne ŝi, sed li”? Povas esti embarase kaj malkomforte por vi ambaŭ. Sed per uzi na ri, vi antaŭsupozas nenion kaj do en iu nivelo sciigas vian kunparolanton ke vi akceptas ajnan seksan orientiĝon.

Tiaj problemoj povas okazi ne nur kiam oni parolas pri koramikoj, sed ankaŭ pri aliaj familianoj. Dua situacio: Vi parolas pri “gepatroj”. La esprimo “gepatroj” supozas ke ĉiu homo havas unu patrinon kaj unu patriĉon. Kaj tio ne estas realeco. Kio se via amiko havas du patrinojn? Nia lingvouzo devas inkluzivi ĉiujn specojn de familioj, do pli akcepteme estas demandi pri “patroj” (kompreneble en la riisma, neŭtrala senco). Kaj la samo evidente validas pri geavoj, geonkloj, geedzoj ktp.

Tria situacio: Eble iu el la homoj pri kiuj vi parolas ne volas esti perceptata, kaj do nomata, kiel ino aŭ iĉo. Ne ĉiuj homoj identiĝas kun unu el tiuj ĉi du genroj, kelkaj eble sentas sin kiel ambaŭ, aŭ kiel nek nek, aŭ foje tiel foje tiel, aŭ kiel io alia. Jes, ekzistas pli ol nur du genroj, kaj la pronomo ri

povas helpi al ni speguligi tiun realecon en nia lingvouzo. Ne miskomprenu: jam la origina ideo kiun mi jam menciis, ke ina aŭ iĉa genro ne estu la plej grava kriterio laŭ kiu ni skatoligas homojn, estas treege relevanta. Sed la fakto ke la du skatoloj ne ekzistas estas ankoraŭ plia kialo.

Do, mi esperas ke la supraj ekzemploj pensigis kaj komprenigis vin, kaj ke eĉ se vi decidus ne paroli riisme, vi trovos aliajn manierojn kiel per via lingvouzo konsideri ĉiun kaj ne nei la ekziston de ajna minoritata grupo. Se vi havas tiajn proponojn, bonvolu kundividi ilin! Krome, mi ŝatus peti la spertajn riistojn korekti min se mi ion fuŝis – ĉi tiu artikolo estas mia tutunua provo skribi riisme, do povas okazi. Ho, mi scivolas kiel mi alkutimiĝos al ĉi tio!

Kion mi lernis pri handikapismo

Enhavaverto: infantraktado de handikapuloj, insulta “inspirismo”.

Dum la jaroj 2009-2010, kiam mi ankoraŭ estis studento, mi havis la okazon labori partatempe por la “Porhandikapula Servo” de mia universitato. Mia rolo (kaj de miaj kolegoj) estis tiu de “akompananto” por handikapitaj studentoj: depende de la kazo, mi devis akompani ilin de iliaj hejmoj, aŭ de la bus/trajn-stacidomo, al la fakultato kaj reen, helpi dum la moviĝoj de unu lecion-ĉambro al la alia, resti kun ili dum la tagmanĝa paŭzo, k.s.

Tiu ĉi sperto estis sendube tre signifa kaj lerniga por mi, ĉefe pri kio rilatas mian sintenon al diverseco. Fakte mi devas konfesi ke mi ĉiam entuziasme kaj scivoleme rilatis al diverseco kiam temis pri raso, kulturo, religio, aŭ seksa orientiĝo, sed ial mi ĉiam sentis min malkomforte interagi kun handikapuloj. Danke al tiu ĉi laboro mi certe superis multajn mensajn barojn, kaj samtempe mi ekkonsciis pri kiom ili estas disvastigitaj inter la ne-handikapitoj. Ĉi-sube mi volas listigi nur kelkajn observojn, kiuj ŝajnas ne esti tiom memevidentaj kiom oni povus supozi. Se inter niaj legantoj estas iu, kiu havas rektan sperton de handikapeco, mi tre ŝatus se ri povus aldoni pliajn pripensojn.

1) Eĉ **handikapuloj plenkreskiĝas**. Estas ia ofta tendenco trakti homojn kun fizika handikapo kiel infanojn, eĉ kiam ili evidente ne plu estas tiaj.

Kvankam la studentoj, kiujn mi akompanis, estis miaj samaĝuloj, la homoj traktis nin tre malsame. Ekzemple ili uzis la respektajn pronomojn por alparoli min, dum ekparolante kun la handikapulo ili ekuzis la neformalajn pronomojn, foje kunigitaj al infaneca lingvaĵo kaj patosaj vizaĝesprimoj. Foje eĉ okazis ke, en kafejoj aŭ vendejoj, la deĵorantoj nur parolis kun mi, antaŭsupozante ke mi mendos kaj pagos por ambaŭ.

2) **Se vi ne povas helpi, almenaŭ ne malhelpu... kaj ne paniku!** Kelkfoje ŝajnis al mi ke la apero de handikapulo en klasĉambro, kafejo, buso, ktp. kreis en kelkaj ĉeestantoj panikon, ĉar ili volis nepre montri sin helpemaj, sed samtempe ne sciis kion fari, kaj kelkfoje la rezulto estis ke ili eĉ malhelpis per siaj nenecesaj prizorgoj. Ekzemple mi havis interesan sperton enirante urban buson kun homo sur rulseĝo: la aliaj veturantoj komencis moviĝi kiel frenezuloj kaj oferti helpon, sed sen vere liberigi la spacon por rulseĝoj, kio fakte estis la nura bezonata ago. Prefere ne faru antaŭsupozojn pri la bezonoj de la aliaj. En multaj kazoj ili mem petos helpon, se necesa, kaj en aliaj kazoj sufiĉas afable demandi “Ĉu mi povas helpi?”, kaj neniu ofendiĝos, nek kreiĝos embarasa situacio.

3) **Ne ĉiuj estas samaj.** Alia tendenco tre kutima estas konsideri la handikapulon kiel ne multe pli ol reprezentanton de granda kategorio, kaj tio havas du ĉefajn konsekvencojn. Unuflanke oni emas apliki al la tuta kategorio konsiderojn validajn nur por unu aŭ kelkaj anoj el ĝi. Ekz. oni povas pensi ke se onia najbaro, kiu estas sur rulseĝo, trankvile ŝercas pri sia kondiĉo aŭ volonte rakontas pri sia akcidento, tiam oni rajtas ŝerci aŭ demandi al iu ajn sur rulseĝo pri lia kondiĉo. Ĝenerale estas eraro pensi havi ajnan rajton sur aliaj homoj, kvankam tio tre kutimas kiam temas pri subpremitaj grupoj. Pli konkrete, ĉiu homo estas malsama, kaj viaj antaŭsupozoj povas esti ofendaj kaj danĝeraj. Aliflanke, limigi la individuon al sia handikapeco povas ankaŭ signifi atribui al li pozitivajn ecojn aŭ pozitivan inspirigan rolon. Kvankam povas ŝajni afable esprimi sian admiron, tio ofte montras supraĵan aliron al la homo mem. Krom ke ne ĉiuj ŝatas estis daŭre memorigitaj pri kiom ilia vivo malfacilas, ne ĉiuj handikapuloj estas kuraĝaj superherooj, kaj ne ĉiuj taksas sin mem malbonŝancaj. Certe vi povas trovi aliajn specifajn ecojn en la individuo, pri kiuj komplimenti rin.

4) **Agnosku kaj komprenu la privilegion.** La privilegio de nehandikapitaj homoj estas unu el la malplej ofte agnoskitaj en la socio. Homoj, konscie aŭ subkonscie, pensas ke handikapuloj havas malbonŝancon pro kiu neeviteble ili ne povas fari ĉion, kion la alian faras.

Tio kelkfoje povas esti vero, sed ofte estas maniero ne rekoni ke la socio estas konstruita forgesante pri la bezonoj de tiuj, kiuj ne havas specifajn fizikajn ecojn. Pensante tiel, ni kvazaŭ deklaras ke handikapuloj estas duarangaj homoj, ke ili ne havas la samajn rajtojn ol la nehandikapitoj. Okazis al mi aŭdi homojn plendi, ĉar handikapulo postulis povi utiligi sian rajton uzi la publikajn transportojn aŭ frekventi universitatan lecionon. Oni devus fokusi la atenton ne tiom sur la handikapo, kiom sur la bariloj, kaj prioritatigi la klopodojn por forigi ilin.

Kelkaj konsiloj pri konsento

Enhavavertoj: perforto, seksumado, ebria seksumado.

Lastatempe ni feliĉe iĝis pli sukcesaj en batalo kontraŭ la **mito ke kiam virino diras „ne“ ri celas „jes“**, ke ri nur volas esti pli intense konvinkita aŭ alimaniere venkita, por ke ri ne ŝajnu kiel tro facila celo. (Kaj foje tio estas vero: ekzistas inoj kiuj diras “ne” celante “jes”, ĉar la socio hontigas ilin pro deziri sekson kaj ne timi esprimi kaj eĉ aktive realigi tiun deziron. Tia ĉi situacio estas neakceptebla. Ni devas krei mondon en kiu estas enordo por inoj voli seksumi, fakte en kiu estas enordo por ĉiuj homoj libere decidi ĉu kaj kiel ili volas seksumi kaj povi rekte diri tion.) Do, plejparte homoj jam komprenas ke “ne” ne signifas “jes”. Bone, sed tie la afero ne finiĝas. **Se iu ne diras ne, sed nek jes, tio ankoraŭ ne signifas konsenton.** La jeso devas esti tute eksplicita, ne subkomprenita en la stilo de “silento estas konsento”. Sed bedaŭrinde ĉi tiu bezono de eksplicita, eldirita “jes” foje kaŭzas novan miskomprenon: ke konsento estas igi homon jesi, ajnmaniere (interalie per premo aŭ trompo), kaj se oni sukcesis tion, tiam oni jam senzorge rajtas fari ion ajn. Sed tio absolute ne ĝustas: nome, konsento devas havi specifajn ecojn kaj cirkomstancoj por esti valida. Se mi vortumu tion malmilde: eĉ **“jes” ne ĉiam signifas “jes”**. Konsideru la jenon:

- **Konsento devas esti entuziasma.** Tio signifas ke “jesoj” vortumitaj kiel ekzemple “hm... mi ne certas... nu, bone, se vi volas” ne kalkuliĝas kiel veraj jeso. La sincera volo devas esti malambigua.
- **Unu konsento ne validas por ĉiam.** Se via partnero konsentis seksumi kun vi ĉe unu okazo, tio ne signifas ke la konsento validas ekde tiam por eterneco kaj vi neniam plu bezonas rekontroli ĝin. Se vi ekzemple fikis lastnokte, ne supozu aŭtomate ke ri volas tion

ankaŭ ĉimatene. Eĉ se vi estas en serioza plurjara amrilato kaj amoris jam milfoje, ri daŭre rajtas elekti ne fari ĉi foje. (Kaj entute, la afero pri amrilatoj kiun oni ofte ne komprenas estas ke nur ĉar iu estas via koramiko aŭ edzo, tio ne signifas ke ri ne povas perforti vin.)

- **Unu konsento ne validas por ĉio.** Se vi ekhavis konsenton por unu speco de aktiveco, tio ne signifas ke ĝi aŭtomate rajtigas vin fari ĉion alian. Se iu konsentis al kisado, vi ne supozas ke vi sendemande rajtas ekzemple fiki rin en la pugon, ĉu ne? Simile tio funkcias en pli nuancaj kazoj, ekzemple iu povas konsenti kun fingrumado sed ne kun buŝa seksumado, k.s. La celo estas laŭeble konkrete sciigi unu la alia(j)n kaj pri kion vi deziras, kaj pri kion vi ne deziras, kaj rezulte fari aferojn kiuj plaĉas al ĉiuj. Se vi pri io ne certas, demandu.
- **Vi rajtas ŝanĝi opinion iam ajn.** Ne gravas se vi jam estas hejme ĉe ri, eĉ se vi jam estas senvestiĝintaj, eĉ se vi jam estas meze de seksumado – se vi ne plu deziras fari ion, kion vi antaŭ momento volis, estas tute en ordo: vi *ĉiam* rajtas ŝanĝi opinion kaj repreni la donitan konsenton. Ne timu komuniki tion.
- **Ne puŝu.** Se via partnero ekzemple unue hezitemas, sed fine donas konsenton post aŭdi argumentojn kiel “se vi amus min, vi farus tion por mi”, ĉu vi pensas ke tiu konsento estis vera? Tro ofte okazas ke homoj timigas, hontigas, pruvigas, ĉantaĝas aŭ alimaniere puŝas aliulojn por ekhavi “konsenton”. Tio estas aĉega, bonvolu neniam fari tion. Ekhavi konsenton signifas certiĝi ke la volo *jam ekzistas* ĉe la alia persono, ne manipuli rin ĝis kiam la de vi dezirata ago estas pravigebla.
- **Ebrie ne eblas doni konsenton.** Mi komprenas ke ĉi tiu punkto estas aparte malfacile akceptebla, mi mem ankaŭ tre fikemas kiam mi ebrias, sed vere: se vi ne povas klare pensi, vi ne povas doni sinceran konsenton, bedaŭrinde. Unu biero estas enordo, sed se vi estas tute ebria, vi ne povas juĝi kion vi vere volas. Krome, tia seksumado povas esti danĝera, ekzemple pro nezorgo pri protekto k.s. Kaj se vi sobras kaj estas kun partnero kiu evidente ebrias: kiom ajn entusiasme ri esprimas ke ri volas fiki kun vi, ne kredu rin.

Entute, mi dirus ke la plej grava afero kiun vi memoru estas **komuniki kaj demandi**. Ĉiam kiam vi ne certas. Kaj eĉ kiam vi *pensas* ke vi certas. Vi ne povas scii kion la alia volas simple laŭ serĉi iujn signalojn en ria konduto (“ja ni flirtis la tutan vesperon, kompreneble ke ri ankaŭ volas fiki kun mi” estas stultaĵo). Ne, demandi estas la sola maniero kiel vi povas ekscii kion la alia volas. Foje homoj ne demandas ĉar ili timas ke ili ne ŝatos la

respondon. Sed ja ĉefe en tiuj kazoj kiam vi timas nean respondon estas absolute neprege ke vi certiĝu!

Eble vi nun pensas: “Kial ĉio ĉi estas mia respondeco? Kial *mi* devas demandi? Ĉu ne estas la respondeco de la aliulo mem diri se ri ne volas ion fari?”. Unue, komprenu ke ekzistas multaj kialoj kial iu povas ne diri. Eble ri timas doni la impreson ke ri estas ĉastemulo aŭ incitemulo. Eble ri tre amas vin kaj pro tio superigas vian volon super la sian. Eble estas ria unua fojo, ri ne scias kiel fari tiajn aferojn, kaj do fidas ke vi pli bone scias. Due, kial vi kiel bazon supozas ke ĉiuj, se ili ne klare diras la malon, volas seksumi kun vi? Ĉu la baza supozo ne devus esti ke ili nenion volas, kaj ke se ili volus, ili esprimus tion aŭ de si mem, aŭ kiel reagon al via demando? Tia ĉi pensmaniero, eĉ ne pridubi ĉu alies deziro estas sama kiel la via, estas parto de la en la kulturo de perforto. Kulturo de perforto signifas interalie ke onia respondeco protekti sin kontraŭ perforto estas pli memkomprenebla ol onia respondeco ne perforti aliajn. Mi ne celas kulpigi iun, certe ne iĉojn – tute male, mi volas diri ke **iu ajn, sendepende de genro, inkluzive de vi kaj homoj kiujn vi amas, povas trovi sin en la rolo de aŭ perfortito aŭ perfortanto, ofte sen konscii pri tio.** Tial vi ambaŭ (aŭ ĉiuj, kiom ajn da vi estas) devas zorgi unu pri la alia.

La supre listigitaj punktoj ankoraŭ ne estas memkompreneblaj evidentaĵoj por ĉiu, sed mi esperas ke ili laŭeble plej baldaŭ iĝos tiaj. Nun ili eble al iuj ŝajnas tro embarasaj aŭ malfacilaj (jes, ni bezonas interalie krei socion en kiu babili pri seksumado estas normale), sed kredu min ke tre indas, eĉ necesas, ĉar tiu relative malgranda peno povas preventi tre malbonajn spertojn.

Kontraŭdiskriminacia teamo helpos haltigi seksĝenadon en Esperantujo

Enhavaverto: seksĝenado.

Nuntempe en pluraj kongresoj funkcias teamoj pri atentema kunestado. Unuan fojon tiu ideo aperis en JES 2014/15 sub la nomo kontraŭdiskriminacia teamo. Jen intervjuo kun ĝia fondinto Tabea, kiun ni faris antaŭ la JES.

Bonvolu klarigi kio estas la kontraŭdiskriminacia teamo.

La kontraŭdiskriminacia teamo konsistos de volontuloj adreseblaj kaze de seksĝenado, perforto aŭ diskriminaciaj spertoj dum la aranĝo. Ni provos solvi la konfliktojn en la rolo de eksteraj interuloj, kiuj povas atentigi la ofendantulon pri ria agado, forigi malkomprenojn kaj subteni la viktimon en diskuto kaj kun la emocia prilaborado de la okazo. Krome nia teamo estos helpema en kazoj de kvereloj aŭ simple se iu bezonas aŭskulteman homon pri rompitaĵoj, nostalgio aŭ alia malfeliĉo. Ni tiel celas kunkrei pli komfortan, sekuran kaj liberan etoson ĉe esperantaj aranĝoj!

De kie vi inspiroviĝis?

Mi iam en grupo diskutis la problemon de seksĝenado en esperantujo. Mia tiama koramikino pro tia kialo sin sentis vere malkomforta ĉe pasinta renkontiĝo kaj iu menciis, ke de ie ri aŭdis pri la koncepto “Awareness Team” de neesperantaj eventoj. Mi decidis realigi tion ankaŭ en esperantujo.

Kial vi pensas ke io tia necesas en esperantaj kongresoj? Ĉu vi ne timas ke la ekzisto de la teamo povas krei malbonajn antaŭjuĝojn, t.e. ke la partoprenantoj kredos la aranĝon esti pli malsekura ol ĝi vere estas?

Esperantistoj certe estas tre speciala grupo en multaj aspektoj. Tamen ni ĉiuj estas homoj, kaj ankaŭ ĉe ni povas esti – kaj estas – reproduktataj malbonaj kondutmanieroj kaj potencstrukturoj de niaj socioj. Mi jam mem spertis seksĝenadon kaj perforton de esperantistoj kaj de multaj – precipe inoj* – aŭdis pri kompareblaj problemoj. Gravus ke ni ne ignoru la fakton, ke ankaŭ ĉe niaj aranĝoj seksismo, diskriminacio kaj ignoremeco ekzistas. Gravus, ke ni faru ion por ŝanĝi tiun fakton. Dum la pasintaj du semajnoj,

post anonco de la teamo mi jam ricevis multe da pozitivaj reagoj. Mi do pensas, ke la ekzisto de la teamo ne estos miskomprenata, sed vidata kiel garantio por pli da sekureco.

Kiaj problemoj okazadas dum kongresoj?

Tro ofte mi jam spertis, ke ĉe esperantaj aranĝoj iu partoprenanto daŭre sekvas alian, alparolas, komplimentas rin kaj eĉ ripete proponas seksumadon – sen konscii, ke la alparolata sentas sin malkomforta kaj ĝenata. Por la sekvata persono tio signifas grandan streĉon, tamen ri ofte ne aŭdacas aŭ sukcesas sufiĉe klare esprimi rian malplaĉon. Tiuj formoj de seksĝenado povas eĉ fojfoje konduki al fizika seksmolesto aŭ seksperforto. Ankaŭ aŭdeblas diskriminaciaj rimarkoj kaj sufiĉe dolorigaj opinioj aŭ fivortoj. Fojfoje la ofendatulo sentas, ke ri ne havas la ŝancon aŭ energion klarigi la dolorigan potencon de tiaj vortoj al la ofendanto.

Kelkaj homoj diros, ke plenkreskaj esperantistoj mem solvu siajn kverelojn kaj problemetojn.

En niaj socioj ekzistas mekanismoj por silentigi diskutojn pri tiaj aferoj. Ofendantoj malkonfesas sian kulpon, ofte la komunumo subtenas la ofendantojn, eble ĉar la homoj ne volas kredi ke en ilia ĉirkaŭaĵo povas okazi malagrablaj situacioj, aŭ ĉar ili emas eviti konflikton kun la ofendanto. Finfine viktimoj estas eĉ akuzataj ke ili troigas aŭ estas “ĉiesulinoj” kaj do mem provokis la moleston. Akuzo de la viktimo (angle “victim blaming”) estas fundamente malĝusta – por seksa molestado kulpas sole la molestanto mem. Pro tia tendenco estas komplika kaj emocie streĉiga por viktimoj mem solvi kelkajn problemojn kun siaj ofendantoj. Por ni kiel eksteraj homoj povas esti pli facila alparoli la ofendantojn pri ilia konduto. Krome diversaj membroj de la teamo havas diversajn privilegiojn, ekz. de esti cisuloj, aliseksmaj, blankuloj, iĉoj* ktp. kaj pro tio ili en diversaj situacioj estas perceptataj pli serioze, aŭtoritataj ktp. Sciante pri tia fakto ni povas senteme uzi ĝin al ĉies uzo.

Kio estas viaj atendoj?

Mi memkompreneble esperas, ke ni ne havos multe da laboro. Eble jam la ekzisto de la teamo atentigos pri la problemoj kaj pensigos la partoprenantojn pri ilia konduto. En kazoj, en kiuj nia helpo estos bezonata kaj petata, mi esperas, ke ni povos solvi la konfliktojn al ĉies kontentigo. Plej grava por tio certe estos forigo de miskomprenoj.

“Ĉe ni virinoj ne rajtas pagi!”

Enhavaverto: manipulemo de iĉoj, perforto.

Ĉi semajne mi ŝatus paroli kun vi pri tre ofta problemo kiun la plejmulto el ni jam renkontis dum rendevuo. Temas pri la demando de pagado. Certe estas multaj aliroj al la afero, ĉar ne ĉiuj rendevuoj rilatas al viroj kaj virinoj, sed ĉar mi ne spertas pri la aliaj situacioj, nur pri mia propra, kiel virino rendevuanta virojn, mi ŝatus en tiu ĉi artikolo montri al vi la situacion de mia vidpunkto.

Ni vivas en mondo kie la respondo al la demando pri pagado estas ofte konsiderata klara: viro! Pli da homoj ol ni supozus vere kredas ke ĝi estas la ĝusta respondo, malgraŭ la seksismo kaj malegaleco kiun ĝi montras. Iuj kredas, ke estas la taŭga sinteno de ĝentlemano, pro la longtempaj sociaj kutimoj, aliaj simple kaj malferme ŝatas senti sin en la pli forta pozicio. Ĉiuokaze, se unu persono (Paganto) insistas pagi por la tuta rendevuo, ĝi implicite igas la okazaĵon merkata transakcio, kie oni igas seksumadon kaj homan korpon merkataindaĵo. Ĝi subtenas la ideon ke seksumado estas planita kaj rajtigita laŭ tiu ĉi „kontrakto“. Per pagado por la alia persono la Paganto igas la malegalecon en la interrilato eĉ pli forta, metante la alian en suban pozicion, kie tiu povas esti „aĉetita“. Paganto subkonscie igas la alian senti ke ri ŝuldas ion, kaj Paganto sentas ke se tiu „io“ ne estas volonte donita, ĝi povas esti prenita. En tia ĉi situacio la persono kompreneble sentas sin mallibere kaj malkomforte, eĉ se tio ofte ne estas la intenco de la Paganto.

Antaŭ nelonge mi spertis similan okazaĵon, kiam mi interkonsentis pri renkontiĝo kun nekonatulo rete. Unue ri proponis trinkejon kie ni havu koktejlon. Ri prenis min alla plej stila ejo en la urbo, kie la prezoj estis duoble pli altaj ol aliloke kaj kiu estis dekoraciita per miloj da etaj lumoj. Tio ĉi igis min senti min malkomforte, mi ekkosnciis ke mia unua eraro estis ke mi ne klarigis la situacion antaŭe kaj ke ni ne difinis la naturon de la renkontiĝo. Fine ni ambaŭ insistis pagi, sed kiel jam ofte antaŭe, kiam ni ambaŭ samtempe donis la monon, la kelnero aŭtomate prenis ĝin de la viro. Mi pluinsistis redoni la monon kaj ri rifuzis, dirante ke mi pagu venontfoje. Nu, ne parolante pri la fakto ke mi jam tiam sciis ke mi ne volas iun venontan fojon do ĝi estis nur plia premo sur mi, mi trankviliĝis decidante ke post la manĝo mi jam nepre pagos.

La restoracio ankaŭ estis tre luksa kaj moderna, kaj jam en tiu ĉi etapo ri komencis tuŝi miajn manojn en hazardaj momentoj, kio estis ekstreme malkomforte al mi, sed subkonscie mi sentis ke estus maldece diri ion, ri ja pagis por mi kostegan drinkaĵon. Post la manĝo mi insistis pagi al la kelnero, mia akompananto ankaŭ insistis pagi, kaj kompreneble la pago estis denove akceptita de ri. Sed ĉi foje mi ne volis lasi la aferon tiel facile. Mi insistis al la kelnero preni monon de mi, al kio ri respondis: „Ĉe ni virinoj ne rajtas pagi“!!! Jes, “virinoj ne rajtas pagi” ri diris. Mi ne povis kredi. Kaj mi diris al ri rekte, ke tio estas ekstreme seksisma. Tiam mia akompananto prenis min kaj ŝovis al la pordo, PARDONPETANTE PRI MI al la kelnero! Ekstere surstrate ri pluprovis hazarde tuŝadi min, kaj fine kun granda strebo je malokulfrapeco ri metis sian brakon ĉirkaŭ miaj ŝultroj en la tipa rendevua brakumo! Tion mi jam ne povis elteni, do mi rekte petis al ri ĉesi, ĉar estas malagrabla al mi kiam nekonatuloj tuŝas min. Ne estas ĝuste ke mi, kiel virino, devas elteni tian agadon de iu kiu devige pagas por mi malgraŭ mia forta malkonsento, kaj poste insistas havi rajton je mia korpo, eĉ se mi dum la tuta vespero klare montris mian malŝaton al la fizika kontakto. Mia eraro certe estis ke mi ne tuj klare diris kion mi pensas. Mi devas agnoski ke mi ankaŭ estas influita per la perforta kulturo de nia socio kaj kvazaŭ pensis ke mi ne rajtas kontraŭi rian agadon, ri ja estis deca kaj agis por mi. En la estonteco mi strebos neniam plu fari tiun eraron, kaj mi konsilas al vi ĉiuj pensi profunde pri tiu ĉi afero.

Mi sentis min ege malkomforte ĝis la fino, estis klare ke ri sentis sin ofendita per mia honesta esprimo, kaj ankaŭ mi estis ofendita pri la pag-problemo. Tamen ri insistis pri plia renkontiĝo, igante min konsenti je ĝi antaŭ ol mi foriris. Mi denove sentis min devigata jesi, ĉar ja ri pagis kostajn drinkaĵon kaj vespermanĝon al mi. Nur hejme mi plene ekkonsciis kio vere okazis, kaj mi forte bedaŭris ne estinti sufiĉe memfida kaj konscia por klarigi ĉion al ri tuj. Mi lasis min esti aĉetita per manĝo, dio mia!

Mi komprenas ke estas malfacile ŝanĝi la sociajn kutimojn, eĉ se ili estas forte diskriminaciaj kaj minacaj al multaj el ni. En tiu ĉi situacio mi lernis multon, kaj ekde nun provos antaŭsolvi la problemojn interkonsentante ĉiam antaŭ renkontiĝoj pri specifaĵoj, kiel ekzemple: ĉu temas pri simpla renkontiĝo aŭ rendevuo, kiu el ni pagos, kien ni iros kaj kion ni nepre (ne) volas ke okazu. Se ni havos tiajn antaŭajn interkonsentojn, estos multe pli facile senti sin komforte, kaj miskomprenoj estos multe malpli verŝajnaj. Tio igos la renkontiĝon sekura kaj agrabla por ĉiuj partoprenantoj kaj ni

povos koncentriĝi pri gravaj interrilataj aferoj anstataŭ pri sentoj de timo, malkomforto aŭ honto.

Kontrollisto pri Alirebleco

Ĉi tio estas listo de kontrolindaj aferoj, kiam oni aranĝas eventon aŭ programeron, por ke ĝi estu kiel eble plej alirebla por ĉiuj. Mi uzos la vorton ‘aranĝo’ por signifi kaj eventojn kaj programerojn ene de eventoj. Kompreneble ĉi tiuj punktoj ne ĉiuj estos atingeblaj por ĉiu aranĝo, sed indas informi ĉeestantojn, pri kio disponeblos kaj kio ne. Ekz. se estas Fejsbuka evento, ĝi kiel eble plej klaru priskribu la relevantajn alireblecajn informojn.

‘Alirebla’ en ĉi tiu kunteksto havas pli vastan signifon, signifante laŭvortan fizikan kapablon (ekz. estas lifto por homoj, kiuj ne povas uzi ŝtuparon), sed ankaŭ konsideron pri etoso kaj kondiĉoj kromaj, kiuj povus malkomfortigi aŭ endanĝerigi iun.

- Ĉu estos senŝtupa alireblo? Ĉu tio estos klare montrita (ekz. per ŝildo) kaj ĉu homoj estos antaŭe informitaj pri kiel ĝi funkcias? Ekz. se estas lifto por rulseĝoj, estu klara priskribo pri kiel uzi ĝin, kiom granda ĝi estas ktp.
- Ĉu vi diris sufiĉe longe antaŭ la aranĝo kie kaj kiam oni renkontiĝos? Por homoj kun iuj mensosanaĵ kondiĉoj estas tre utile kaj komfortige havi tiajn informojn sufiĉe longe antaŭe, kaj iuj handikapuloj bezonos tiujn informojn antaŭe por plani kiel alveni.
- Ĉu disponeblos necesejoj por handikapuloj?
- Ĉu disponeblos genroneŭtralaj necesejoj?
- Kiom brua/homplena estos la spaco? Iuj homoj ne sentas sin komfortaj renkontiĝi en brua/homplena loko.
- Ĉu estos senalkohola spaco? Ne ĉiam gravas por klare difinitaj ‘drinkaj’ aranĝoj, sed ja por aliaj ĝeneralaj aranĝoj. ‘Spaco’ estas svaga termino – la ĉefa afero estas, ke homoj, kiuj ne drinkas aŭ ne povas drinki rajtos ne drinki sen esti malkomfortigitaj aŭ juĝitaj.
- Kiom varmaj estos homoj? Ekz. ĉu oni estos ekstere en malvarmo dum longa tempo sen metodo revarmiĝi aŭ reiri enen.
- Ĉu estos komfortaj seĝoj?

- Ĉu la varbmaterialoj estas alireblaj? Ekz. ĉu la tiparoj sur flugfolioj estas facile legeblaj por homoj kun disleksio.
- Ĉu oni aplikos tie sekurspacan regularon (ekzemplon de tia regularo vi povas trovi ĉi tie)? Tio ne ĉiam endas, sed utilas informi homojn pri tio, speciale se temas pri kunsido aŭ diskutrondo.
- Ĉu estos facila maniero foriri de la ĉambro? Ekz. se oni sentas sin malkomforta aŭ ĉagrenita pro la diskuttemo.
- Ĉu homoj devos elspezi monon? Se jes, kiom multe kostos?
- Ĉu oni provizos manĝaĵojn kaj trinkaĵojn? Ĉu ili bonos por homoj kun oftaj alergioj/bezonoj (ekz. alergio kontraŭ nuksoj, veganeco)? Ĉu estos ankaŭ nealkoholaj trinkaĵoj se estos alkoholaj?
- Ĉu probable estos aliaj homoj, kiuj uzas la spacon? Kiuj ili verŝajne estos kaj ĉu la ĉeestantoj sentos sin komfortaj ĉirkaŭ ili? Ekz. se estas aranĝo por GLAT-uloj, ĉu estos homoj, kiuj eble minacos/ĝenos ilin?
- En kia konstruaĵo okazos la aranĝo? Ĉu ĝi malkomfortigos homojn pro sia religia stato, pompeco, aŭ alia trajto? Ekz. ne ĉiuj sentos sin komforte en preĝejo, aŭ en tre pompa konstruaĵo.

Kion Zamenhof dirus hodiaŭ?

Enhavaverto: rasismo

Hodiaŭ, la 15an de decembro, esperantistoj en la tuta mondo celebras la memoron de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof. Sed Zamenhoftago temu nek pri tosti kaj festeni kun samideanoj, nek pri aĉeti esperantan libron. Laŭ mi, ĝi temu pri tio ke ni honorigu la ideojn de Zamenhof per vivi ilin, do per apliki ilin al nia situacio ĉi tie kaj ĉi tiam. Ĉirkaŭrigardante, mi ne povas ne rimarki ilian akran aktualecon. Por situi min geopolitike: mi loĝas en Eŭropo. En la pasintaj monatoj, la plej diskutata temo ĉi tie estas la tielnomata rifuĝinta krizo. Unufraze temas pri tio ke grandaj kvantoj de homoj nuntempe serĉas azilon en Eŭropo. La reago, almenaŭ en ŝtatpolitika nivelo, bedaŭrinde estas bazita sur forta divido inter “ni” kaj “ili” laŭ popoloj kaj religioj – la preciza malo de kion Zamenhof volus. Mi volas per kelkaj koncizaj ekzemploj montri al vi kiom forta kontrasto ekzistas inter zamenhofaj ideoj kaj lastatempaj politikaj okazaĵoj:

Mi vidas en ĉiu homo nur homon, kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia (sic) persona valoro kaj agoj. Ĉian ofendadon aŭ premadon de homo pro tio, ke li (sic) apartenas al alia gento, alia lingvo, alia religio aŭ alia socia klaso ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

– Zamenhof, Deklaracio pri homaranismo

Aŭgusto: Slovakujo decidas akcepti nur kristanajn rifuĝintojn. Pluraj landoj (ekzemple Polujo, Hungarujo, Kipro) esprimas la saman deziron, kvankam iom malpli rekte ol Slovakujo.

*Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.*

– Zamenhof, La Espero

Septembro: Hungarujo starigas barilon je sia landlimo por malebligi ke amasoj da rifuĝintoj eniru la landon. Ankaŭ aliaj ŝtatoj (ekzemple Makedonujo, Grekujo, Bulgarujo) sammaniere baras eniron al la homoj.

...ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

– Zamenhof, inaŭgura parolado de la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco

Novembro: Eĉ Svedujo, unu el la eŭropaj landoj kiuj propravole akceptis la plej grandan parton de la homoj, signife striktigas siajn regulojn, malfaciligante la situacion por la azilpetantoj.

Kompreneble, la rifuĝinta krizo estas nur unu el la aktualaĵoj pri kiuj necesas nia agado. En tiu ĉi tago, ni kaptu la okazon por nin demandi kion Zamenhof pensus pri la nuna situacio, kaj kion ni povas fari por ŝanĝi ĝin. Do, mi kredas (kaj ĉi supraj ekzemploj montras) ke Zamenhof volus ne nur ke ni, kiel individuoj, vidu en ĉiu homo nur homon, sed ankaŭ ke ni diversmaniere, interalie per politika premo, agadu por socia justeco.



Egalecen estas la unua blogo pri feminismo en Esperanto

Ĉi tiu libreto konsistas el kolekto de kelkaj elektitaj artikoloj de nia blogo. Ni decidis printi ĝin por ke la artikoloj estu alireblaj ankaŭ al homoj, kiuj ne havas eblon legi la blogon interrete, aŭ deziras uzi ilin en situacioj, kie papera versio pli taŭgas.

Vi povas trovi pli ĉe **www.egalecen.wordpress.com**.

La libreto ekestis helpo de TEJO, pere de la fonduso Trampolino. Ni ŝatus preni ĉi tiun okazon por danki pro la subteno.



la aliaj

cirkonstancoj.

pro historiaj

la aliaj

ĝuas la privilegion

ĉiuj

Ĉiun

Justeco

Justeco

Justeco